



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakelo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

UNUA DATREVENO DE "NIA VIVO"

NIA PROGRAMO

Ni diris hieraŭ: «Jen leganto, modesta rezultato de esperplena nia laboro...» «nova lumeto, kies radiojn povos kreskigi via ukcepto kaj laŭpova helpo...»

«Bulteno, revuo, presaĵo; ne gravas. Ni dezirus nomi ĝin revuo, sed ni ne kuraĝas ankoraŭ.»

«Celoj? La leganto mem devas signi ilin; iliajn sugestojn ni deziras kaj demandas al ĉiuj.»

Tion ni denove ripetas.

Por fari revuon estas necesa materiala helpo, mono; hodiaŭ ni havas la sufiĉan moralan forton, sed ne la materialan; ni penos, dum nia dua vivjaro por atingi ĝin kaj ni petas al ĉiuj materialan helpon, ĉar se la homo ne nur vivadas per pano, la presaĵo ne povas vivi nur per «spirita pano».

Ni komencis nian vivon kun timo; ni antaŭsentis la malfacilaĵojn, kiujn ni devis venki por atingi niajn deziregojn. Ni devis krei aron da kunverkantoj; ni volus ke NIA VIVO estu lernejo en kiu oni forĝus niajn esperantistojn; iom post iom ni atingas nian deziron; ni jam havas kelkajn el ili, kiuj malkovris sin je nesuspekta alteco kaj hodiaŭ ni havas certigita la kunverkadon kaj la vivon de la nuna NIA VIVO. Ni havas plie bonfamajn plumojn ĉe la hispana esperantistaro kaj ankaŭ ekster nia lando, kiuj oferis sin al ni pro tio, kio NIA VIVO estas kaj reprezentas. Ni kredas pro tio esti atingintaj parton de nia programo.

Ni devas trairi nian vojon per certa paŝado por ne malantaŭeniri en ĝi.

Ni finas tiujn ĉi liniojn per sincera dankado al ĉiuj niaj kunlaborantoj, per plenemocia rememoro al nia iniciatinto, al frupereita Floría kaj al la fondintoj de «Frateco» S-roj Montagut, Gastón kaj Benitez.

FRATECO.

«FRATECO» FELIĈA PATRO DE «NIA VIVO»

NIA VIVO estas jam unu jara, laŭ sia certigaĵo de naskiĝo. NIA VIVO bonfartis dum sia unua jaro. Ni danku al Dio, kiu tion ĉi permesis. Ni danku ankaŭ al Floría kaj Inglada, al Bruquetas kaj Salas, al

fraŭlinoj Salvo, Casanovas kaj Bueno, al Orós kaj Artigas, al Turrión kaj Gastón, al Lopez kaj Lerroux, Martín kaj Martínez, Larruga kaj Marqueta, Serrano kaj Uñez, Marmol kaj Etayo, Pérez kaj Bescós, kaj al ĉiuj, kiuj direktis ĝiajn infanajn paŝojn, kiuj ĝin nutris per la riĉaj fruktoj de siaj genioj, kaj kiuj ĝin subtenis per siaj monhelpoj kaj per siaj konstantaj kuraĝigaj esprimoj.

«Frateco», la feliĉa patro de NIA VIVO, povas fiere montri sian filon al la mirigataj ckuloj de la esperantista mondo... Dum mi kaŝas, en nevidebla angulo de nia asocia loĝejo, mian nepriskribblan emociion de aveto, vera miksaĵo de larmoj kun rideto.

MANUEL MAYNAR BARNOLAS.

Honora Prezidanto de «Frateco».

ANTAŬEN!!

Memorinda estas por ni fratecantoj ĉi tiu monato. Pasintan jaron ni ĉiuj kiuj tutkore amas Esperanton atingis plej gravan kaj belan revon.

Dank' al bela ideo de nia estinta komitatano kaj amiko memorinda. S-ro Floría, kiu bedaŭrinde ne povis vidi plenan vivon de sia ideo, aperis nia bulteno.

Jen nia bulteno post unu jaro de ĝia apero.

Ĉu ĝia laboro estis bona aŭ malbona? Tion mi neniel povas juĝi, ĉar eble ĉiuj supozas, ke nur pasio min regas kiam mi verkas. Sed mi povas paroli ĉar ne estas mi kiu parolas pri nia bulteno, estas fervoraj kaj spertaj geesperantistoj, kiu ĝin legas plezure kaj kiuj ankaŭ diras, ke nia peno tute sukcesis, ĉar nia bulteno ne nur parolas kaj enhavas verkajojn kiuj rilatas Esperanton, ĝi montras ankaŭ taŭgecon de nia helpa lingvo ĉar pritraktas multajn aliajn aferojn.

Per nia malgranda sed, ĉiam interesa bulteno ni disvastigas nian ideon (celon) kaj ni transdonas aliajn ideojn, kiuj precipe ne estas esperantaj sed kiuj povas samtempe interesigi niajn samideanojn; ekzemple se ni verkas aŭ tradukas morojn, kutimojn, legendojn aŭ rakontojn klasikajn

de nia lando, kiujn niaj samideanoj de aliaj landoj neniam juste legus plie per nia bulteno ni praktikas nian lingvon legante kaj verkante ĉar ambaŭ du aĵojn ni faras samtempe.

Kvankam ni ne estu spertuloj, ni estas kuraĝaj kaj ni riskas labori kaj helpi nian societon, por ke ĝi kresku kaj prosperu, ĉar certe se ni agas tiel ni laboras por Esperanto kaj ĝia pligrandigo.

Neniu laciĝu. Antaŭen! Se ni plenumas niajn devojn, eble venontajn jarojn ni atingos vidi nian monatan bultenon pli bela, granda kaj interesa, ĉar ĝi nepre enhavos pli da verkaĵoj ol nuntempe. Tiam ni estos feliĉaj konstatante plezure sukceson.

Kvankam ni trovu barilojn, ni ilin ne devas atentigi ĉar vera esperantisto neniam malantaŭas, kontraŭe ĉiam antaŭen devas iri!

MARÍA CASASNOVA.

UNUJ PAŜOJ DE «FRATECO»

La supra titolo ne signifas, ke mi faros historion de nia societo. Nur mi deziras konigi kiamaniere Esperanto estis enkondukata en Zaragoza.

La unua datreveno de NIA VIVO ŝajnas venigi en nian memoron la komencon de la poresperanta propagando en nia urbo.

Estis la jaro 1908^a. La esperantan lingvon preskaŭ oni ne konis en Zaragoza, kiam unu el la plej entuziasmaj pioniroj, Sro Rafael Benitez, venis kaj sukcesis ĵeti la esperantan semon en taŭgan medion. Sroj Agustín de Montagut kaj Emilio Gastón kuniĝis, plenaj de entuziasmo iliaj cerboj kaj koroj, por triumfigi la noblan idealon.

Tre malfacila estas la laboro de la unuaj propagandistoj en ĉiuj politikaj, religiaj aŭ filozofiaj tendencoj, sed la malfacilaĵoj amasiĝis por malhelpi la iradon de Esperanto. Kian profiton ĝi donas? Nenian pozitivan kaj tuj atingeblian utilon, estis la respondo. Idiomo pli-malpli facila, parolata nenie. Do, oni perdas la tempon lernante lingvon konatan de malgranda nombro da personoj disigitaj en la mondo.

Tamen, nek ŝancelo, nek malkuraĝo ekzistis en la forta volo de la tri pioniroj, kiuj decidis fari publikan alvokon por prezenti Esperanton kaj ĝin lernigi.

En unu el la salonetoj de la Komerca Kazino okazis la unuaj kunvenoj de la esperantoamantoj. Mi ĉeestis en la dua kunveno kaj la entuziasmoplenaj klarigoj de nia ne forgesinda kaj neforgesita Sro Gastón kaptis min por Esperanto pri kies idealo mi de antaŭlonge revis.

Tuj ni sentis la neceson havigi al ni specialan loĝejon kaj okaze, la esperanta societo «Frateco», jam oficialigita, trovis sidejon en la strato Independencia, en unu el la ĉambroj de la malaperinta

kafejo «Iberia». Antaŭe estis salono por kartludi kaj ĉirkaŭ la tablo kovrita per verda tapiŝo, ni ne ludis kartojn, ni interparolis, ni revis pri la estonto de Esperanto kaj «Frateco».

La diversaj religiaj kaj politikaj tendencoj de la ĉeestantoj ne malhelpis nian amikecon ĉar ni kunfandiĝis en la sama celo: propagandi ĉie Esperanton kaj komprenigi ĝian utilecon por la homaj interrilatoj.

Kelkaj el la konstantaj tiamaj pioniroj estis forrabitaj de la nesatigebla morto, sed ili vivas en en la koroj de la malnovaj esperantistoj de Zaragoza kaj ilia memoro kuraĝigas nin por alte flirtigi la flagon kun la verda kvinpinta stelo.

Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan estis kaj estas nia devizo, ĉar ni havas la konvinkon ke konstanta laboro neniam estas senfrukta se ĝi prezentas ion utilan, ion bonan por la homaro.

EMILIO ARTIGAS.

KUNSIDO ĈE «FRATECO»

Dismovante miaj esperantaĵojn mi trovas noton, kiu eble estas oportuna publikigi en tiu ĉi datreveno. Ĝi havas la saman titolon ol tiuj ĉi linioj. La papero diras:

S-ro Floría proponas: «Frateco» devus eldoni ĉiumonatan bultenon.

La kasisto eksvitis. La Prezidanto timeme murmuretas: Mi ne ŝatas komenci kaj ne sekvi; ni unue devas zorgi pezi niaj fortojn.

La kalkulisto S-ro Turrion: Jes, ni havas fortojn por tio.

La latina sekretario per episkopa tono: Etayo adsentior.

S-ro. Floría penas konvinki ĉiujn. F-ino Casasnovas liberigas sian langon kaj dum kvin minutoj prononcas 2.222 vortojn, sed subite haltas vidante ke la kasisto S ro Larruga malsaniĝas.

S-ro Salas. Se ni publikigos la bultenon, nur klasikaj vortoj estos uzataj.

S-ro Maynar: Kiel advokato, mi jesas ke «Frateco» rajtas eldoni eĉ kalendaron pri libertagoj por senlaboruloj.

S-ro Til: Ĉu mi komencas labori?

S-ro Uñez: Mi helpos vin.

S-ro Bruquetas: Mi havas en mia poŝo 70 favorajn voĉdonojn.

S-ro Achón kun sonora voĉo: Estas necese batali; la batalado estas vivo, kaj finis per forta manbato sur la tablon kiu al malfeliĉa Larruga ŝajnis pafado.

La universitata profesoro S-ro Gastón: —Ni devus eldoni ĉiutagan 32 paĝan gazeton.

La kasisto eksaltas kaj furioze iras kontraŭ la parolinto por mordi al li okulon.

La sankta Artigas lin detenas kaj diras: Nur la malbonaj homoj faras malbonaĵojn.

Fino Salvo: Kun tiu ĉi sceno mi verkos kortuŝan artikoleon.

La Prezidanto: Silenton!! Ordon!!! Pro tio ke li ne havas sonorileton batas per plumingo la mallongharan kapon de F. Martínez, kiu kun la mano en la orelo diras: Ankaŭ mi estis tie. La alia Martínez: malbonstilaj vortoj. Legu la linion 12.^a de la 46.^a paĝo de la libro 87 de nia biblioteko.

Silenton!!! Kriadas la Prezidanto maldikiĝante kaj plilongigante sian nazon. La silento alvenas fine. La kasisto ploras. Ĉiuj atentis la estontajn vortojn de la Prezidanto, kiu diras rigardante sian cerbon: S-ro Floría: Vi venkis. Diru la nomon de la etulo. La demandito respondas ridegante: NIA VIVO!!!

NIA VIVO... kaj kelkajn tagojn poste, la Morto, sur la strato, per hazarda pafado, forigis el nian entuziasmeman Floría ne vidinten ankoraŭ la alvenon de sia revo...

JOSÉ ORÓS.

Julio, 1932.

SCIIGOJ

Monhelpantoj de NIA VIVO.—Sen speciala alvoko de ni, sendis sian monhelpon por NIA VIVO, la jenaj esperantantoj:

Sinjoroj: J. J., 1'50; M. L., 3; Zaragoza fratecano, 2; F-ino A. Núñez, 2; V. Inglada, 2'25; J. Lerroux, 2; E. Cano, 2.

Al ili, ni korege dankas kaj ni esperas, ke tiuj ĉi mondaĵoj ekzemple taŭgos por ke niaj samideanoj daŭrigu tian bonan agon.

De la venonta monato Aŭgusto, S-ro Orós parolos antaŭ la mikrofono de Radio Aragón, dum 5 minutoj, la 1^{an} kaj 16^{an} ĉiumonate.

SPRITAĴOJ

Fatala eraro—Dum la geeziĝa vojaĝo juna paro veturis tra longa malhela tunelo. Kiam reheliĝis, la juna edzino kun ruĝiĝintaj vangoj diris al sia edzo:

—«Mi deziras, ke baldaŭ alia longa tunelo venu.—«Kial do?, respondis la edzo, mi tre enuis veturante tra la lasta tunelo.»—«Sed Henriko, ĉu tiu ne estis vi, kiu tiel arde kisis min?»—Konster-nite demandis la edzino.

Edzino: La ĵurnalo diras, ke edzo donacis al sia edzino perlan kolrington, kiu kosta 100.000 pesetojn. Tio neniam okazis al mi.

Edzo: Ankaŭ diras la ĵurnalo, ke edzo mortigis sian edzinon kaj tio ankaŭ neniam okazis al vi.

MALNOVAJ PAĜOJ

LA KVAR JARTEMPOJ

I

Ridetas tre gaje, tre hele naturo:
Ĝin vestas smeralda verdaĵo;
Ĉirkaŭe vidiĝas de vivo plezuro
Kaj ĝojo en ĉiu kreskaĵo.

La suno favore, amike etendas
Al ĉio brilantan radion,
Al ĉio konsolon, feliĉon ĝi sendas
Vivigas, varmigas ĝi ĉion!

II

Naturo jam estas en luksa disfloro,
De vivo matura pleniĝas,
Kaj suno, simila je globo el oro,
En blua ĉielo ruliĝas.

Sed ĝi tro varmege bruligas l'aeron:
L'arbaro jam pluvon avidas,
La herbo flaviĝas kaj falas sur teron,
De l'suno sin kaŝi rapidas...

III

Ĉesigiĝis jam tute varmeĝo somera,
Naturo malgaje forfloras,
Kaj ofte en sia malĝojo sincera,
Per pluvo senhalta ĝi ploras!

Nur vento ribela, trapike fajfante,
Ŝancelas foliojn kun bruoj,
Kaj ilin forpelas, de l'arboj ŝirante..
Ĉagreno, sopiro, enuo!...

IV

Blankiĝas naturo, en neĝo vestita,
Kaj kiel arĝento ĝi brilas;
Per prujno lanuga kaj griza kovrita,
Ĝi al maljunulo similas.

Kaj morto severa vidiĝas en ĉio,
Ĝin forta eĉ frost' ne forigas...
Malvarmo, silento... La suna radio
Nur lumas, sed jam ne varmigas!...

V. DEVJATNIN.

Eltirita el «Esperantisto» n-ro 44, aŭgusto 1893.

Oni avizas ĉiujn «Fratecantojn» pri tio, ke ĉe la mezo de la venonta monato Aŭgusto oni ekskursos en «S. Juan de la Peña». Vonu en la klubon por scii detalojn.

ĈE SORĈISTINOJ

(Daŭrigo)

Tiu maljunulino havis sep vivojn, kiel oni diras ke la katoj havas, kaj ŝi ekresaniĝis antaŭ, ol mi esperis; ne estis mi kiu resaniĝis ŝin; ŝi resaniĝis mem; eble en tiu resanigo havus ian parton la kuracado per la alkoholo, tiam en ĝia apogeo, ankoraŭ nova la metodo «Jacoud»; mia malsanulino trovis ĝin plezura kaj ŝi deputis min, kiel tre eminenta saĝulo, kiam mi donacis al ŝi botelon da konjako por, ke ŝi trinku per kuleroj ĉiu el ili motivigis la ripetadon de la Veda himno.

Mi konsideris kiel resanigita la malsanulinon, farinte multe da favoro, nur kiam la atakintinoj decidis elpigi al ŝi 32 durojn por ŝia nutrado kaj zorgado kaj kiam mastrino Nemesia, antaŭ tiaj konvinkaj argumentoj petis de mi ke mi konsideru ŝin, kiel sana, se ŝi povus esti sana pro siaj jaroj.

Mi estis, mi mem, kiu alportis al ŝi la monon, per arĝentaj moneroj pli ĝuste. Kia sceno! Kiel magia estis la terapeŭtika efiko de la amaseto da duroj! La Veda himno resonis, sed tiun fojon rememorigis la «Magnificat», «Veni Creator», kaj «Te Deum» triumfantan kaj gloran.

Tiel komencis mia amikeco kun mastrino Nemesia, kun ŝia nepino Calixta kaj kun ŝia pranepino Rosiña.

Tiu virino estis sorĉistino, vera sorĉistino; kio estas dirota estas tio, kion la gentoj komprenis per vorto «sorĉistino» kulpigante ŝin kaj, kio estis realaĵo en ŝia sorĉeco.

Mastrino Nemesia estis plena volo, plena karaktero, instinkto kaj vizio vere mirindaj, spirito mirinde observema; granda talento kunigita al la plej granda ignoreco. Mastrino Nemesia havis grandan talenton; tio estas, la povon leviĝi de la fakto ĝis la kaŭzo, dedukti el la kaŭzo la efekton.

Por mi, mi volis ŝian indukciajn kaj deduktajn potencon.

Ŝi posedis pli, multe pli; ŝi posedis la econ de la projekcio de tio, kion Balzac monis la «forton de la volo», tion, kion priskribis Schopenhauer en sia libro «La volo en la Naturo», tion al kio Charcot donis esprimon kaj sciencan formon en liaj neforgeseblaj eksperimentoj de «La Salpetière», kreante la kuracan hipnoton. El kiu ŝi ricevis tiajn instruojn? Ĉu ĝi estis kunnaskita kaj senkonscia kun ŝi? Mi ignoras ĝin; estas certe, ke ŝi uzis la efektojn ne sciante la kaŭzojn.

Mujte helpis al ŝi ŝian vizaĝon, tro stranga. Ŝiaj pupiloj brilis, tage, kiel du gutoj da akvo sub la suno kaj nokte ili havis ian fosforlumecon, kiel la okuloj de katoj; en ŝiaj grizaj okuloj ekzistis ia trema moviĝemo, ia bolanta nekonataĵo enuiga, kiu penigis ŝian rigardadon; tiuj okuloj eljetis ian netuŝeblan energion, ian kaŝitan kaj sekretan forton, kiun oni sentis kaj ne povis esprimi. Kiam ŝi enpenetris ilin en ian ajn personon, premante samtempe ĝian maldekstran brakon, kuntirante la multegajn faldojn kaj sulkojn el ŝia vizaĝo, kiel seka pruno, formulante ŝian bonvolan aŭ malbonvolan petegon, oni sentis ŝia penso enpenetri en la karnon, ĝin trapasi kiel elektra fluo. Tiam la sugestio estis analogia al tiu de serpento sur la birdon, al tiu de iaj hundoj kiuj faligas la katojn grimpintajn sur la alta vinberujo aŭ sur la neatingebla arbo.

Kiel konsekvenco de tio ĉi, estas kiam la maljunulino enigante la rigardadon penetrantan kiel pikilo, en la okulojn de la malamika najbarino, ŝi krius al ŝi: — «Dio volu, ke vi ne alvenu al la vilaĝeto sen rompi la nazojn» ne pasis kvarono da horo sen ke la ensorĉitino, malsuprenirante tra la vojeto, falus kaj rompu la nazon, renversu la kruĉon da lakto kaj jetdisrompu la ovojn, murmuretante malbenaĵojn kontraŭ la sorĉistino. Kio estis tio se ne senartifika sugestio?

Se la petego estis direktata al mamnutranta virino, kiam ŝi diris. — «Dio permesu, ke vi sekiĝu», el dek fojoj, naŭ la virino senlaktiĝis. La ckazintaĵo estis des pli certa, ju pli timema kaj superstiĉa la sorĉistino. Kiu ignoras la impresojn de la emocioj en la laktan elfluon kaj en la patrinajn funkciojn, pli ol unufoje perturbitajn per simpla siropo aŭ la panaj piloloj, anoncitaj kiel venenoj?

Tiaj estis la faktoj, saĝe interpretitaj, faktoj centfoje ripetitaj kaj rimarkitaj de la homoj plej kontraŭa al la ordo *superfizika*.

Ni kunigu al tio la mirindan kapablon pri observado, kiun multaj kuracistoj volus por si mem.

Ŝi rimarkis antaŭ, ol mi la gravedecon de mamnutranta virino, malbone nutrita, senfortigita pro la triobla organisma konsumado de mamsuĉado, gravedeco kaj la senfortiga kampara laborado; ŝi rimarkis en la infana vizaĝo, en ĝiaj komenciĝantaj sulkoj, en la malforteco de la karnoj, la fiziologian mizeron kaj la tujan venon de ruiniga spinmalsaneco, do, kiam la sorĉistino malbenis: — «Ke vi ne atingu filon», estis tute kredeble, ke la viva infano mortos pro konsumiteco kaj ke naskiĝu mizera kaj mortkondamnita tiu, kiu estis naskiĝonta.

Ŝi rimarkis antaŭ, ol neniu la flavan koloron de la konjunktivo de drinkanto, kiu anoncis tujo-kazonta la heptan kiroson, kiu post kelkaj monatoj, konsiliĝis kun la kuracisto; kiam ŝi anoncis do, ke tiu virino vidviniĝus antaŭ tia sezono aŭ malproksima festo, ŝi parolis kiel klinikulo, aŭ almenaŭ, kiel iu el tiuj maljunaj flegistoj de malsanulejo, kiuj tiom da fojoj antaŭdiras ekzakte.

Tia estis la sekreto de la ensorĉaĵoj de nia sorĉistino, kiuj pligrandigitaj, trograndigitaj per la superstiĉo kaj la popola ignorado, garantiita per mem hipnoto faris ne disputebla la famon kaj timindan la ensorĉan povon de mastrino Nemesia.

Kaj se oni aldonas al tio la konadon de la plej intimaj kaj superflujaj detaloj de la vilaĝa vivado, oni komprenos, kiel potencaj estis la elementoj de kiuj ŝi disponis por konservi inter la personaro de ĉia kondiĉo ŝian diablan famon kaj por ke multaj el ili dorlotus kaj regalus ŝin pro timo.

(Daŭrigota).